UNUA DIMANĈO DE ADVENTO – 28-an de novembro 2010

VIGLU POR ESTI PRETAJ JE LIA ALVENO - Komento al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

Mt 24,37-44

En tiu tempo Jesuo diris al siaj disĉiploj:

“Kiel okazis en la tempo de Noa, tiel estos ĉe la veno de la Filo de la homo. Ĉar antaŭ la diluvo oni manĝis kaj trinkis, edziĝis kaj edziniĝis, ĝis Noa eniris en la arkeon. Neniu suspektis ion, ĝis la diluvo venis kaj forprenis ĉiujn. Tiel ankaŭ estos ĉe la veno de la Filo de la homo. Tiam se du viroj estos sur kampo, unu estos forprenata kaj la alia lasata. Se du virinoj estos laborantaj ĉe muelilo, unu estos forprenata kaj la alia lasata.

Do viglu: ĉar vi ne scias, en kiu tago via Sinjoro venos. Sed tutcerte, se la domomastro scius en kiu noktoparto venos la ŝtelisto, li viglus kaj ne lasus sian pordon disbati. Tial ankaŭ vi estu pretaj, ĉar la Filo de la homo venas kiam vi ne atendos”.

Tiuj estas la lastaj paroloj de Jesuo kaj la evangeliisto Mateo ilin ŝarĝas per grandaj teologiaj signifoj. Kaj bedaŭrinde tiuj ĉi pecoj eltiritaj de ilia kunteksto ne povas redoni ilian tutan belecon. Ni vidu kion ni povas el ili eltiri.

Antaŭ ĉio la peco komenciĝas de la versiklo 37, sed sen la 36-a kiu ĝin antaŭas, ĝi ne estas komprenebla. En la versiklo 36 Jesuo estis dirinta: “Rilate al tiu tago kaj al tiu horo tamen neniu ĝin konas. Eĉ ne la anĝeloj de la ĉielo kaj la filo, sed nur la Patro”. Kion li volas diri?

Se rilate la finon de Jerusalemo Jesuo certigis ke “ne pasos tiu ĉi generacio antaŭ ol ĉio tio okazos”, la detruo de Jerusalemo okazos en la jaro 70, rilate la finon de ĉiu Jesuo sin konfidas al la Patro. Por ĉiu generacio estas iu fino de la tempo, tio rilatas do la finon de la personoj.

Kaj daŭrigas Jesuo “Kiel okazis en la tempo de Noa, tiel estos ĉe la veno de la Filo de la homo”. Jesuo kunigas sian savproponon al tiu proponita de Noa kaj indikas epokŝanĝon, la maturiĝon de la homaro, iun savon proponatan laŭ nova formulo. La diluvo ne estis fakte la fino de la mondo, sed la komenco de iu nova komunumo, de iu nova homaro kiu estis renovigita.

“Do Jesuo kunigas la tagojn de Noa kun tiuj de la Filo de la Homo kaj ili ambaŭ estas savproponoj. Noa per la arkeo, kaj Jesuo per la regno de Dio. “. Ĉar antaŭ la diluvo oni manĝis kaj trinkis, edziĝis kaj edziniĝis, laŭvorte la evangeliisto skribas “ili edzinigis sin kaj edzigis sin”. Do sin nutri, geedziĝi, estas agoj de ordinara normaleco de la vivo, kiu tamen, atentigas Jesuo, riskas ne perceptigi, ne rimarkigi la eksterordinarecon de la evento kiu estas superŝvebonta.

Diras fakte Jesuo. “Neniu suspektis ion, ĝis la diluvo venis kaj forprenis ĉiujn. Tiel ankaŭ estos ĉe la veno de la Filo de la homo.” Jesuo do invitas esti viglaj, atentaj, ne lasi sin kapti de la rutino de la ĉiutaga vivo.

“Tiam se du viroj estos sur kampo, unu estos” kaj ĉi tie estas iu traduko kiu ne komprenigas. La traduko de la itala Episkopara Konferenco estas “forportata kaj la alia lasata”. La greka verbo utiligata de la evangeliisto estas “paralambano” kiu signifas “preni” en la senso akcepti. Ni ĝin trovas je la komenco de la evangelio de Mateo kiam la anĝelo diras al Jozefo “ne timu preni kun vi Maria”, do ne estas “forportita” sed estas iu preni por akcepti, por savi.

“Same du virinoj estos laborantaj ĉe muelilo, unu estos forprenata” akceptita, ne forportita, “ kaj la alia lasata”. Kion volas diri la evangeliisto per tiu bildo?

Samkiel la arkeo de Noa ne akceptis, ne enprenis ĉiujn, sed nur tiujn kiuj ekkonsciis pri la superŝvebanta katastrofo, tiel en la regno de Dio estas akceptataj, enprenataj, tiuj kiuj akceptas la mesaĝon de Jesuo.

La savo proponita de Dio estas por ĉiuj, sed ne estas de ĉiuj, ĉar por ĝin akcepti necesas elekti la konvertiĝon, la valorŝanĝon kiuj reguligas la konduton de la homo kaj precipe la unuan beatecon, “De tiuj”, diras Jesuo en la unua beateco, tiuj kiuj elektas propravole la malriĉecon, “de tiuj estas la regno”.

Ne temas do pri tiu negativa bildo “forportata” sed “akceptata por la savo”. Kaj krome Jesuo invitas esti viglaj. “Viglu”, tiu invito vigli estos ripetata tri fojojn ĝis la momento de Getsemano, kaj do Jesuo ĝin kunigas al persekutado “ĉar vi ne scias, en kiu tago via Sinjoro venos”.

La momento de la vero estas la momento de la persekutado, la momento de la kapto de Jesuo, de lia morto, la momento de la persekutado de la disĉiploj, estas tiuj la momentoj en kiuj oni vidas kiu akceptis la mesaĝon de Jesuo kaj kiu ne ĝin akceptis.

Kaj daŭrigas Jesuo “Sed tutcerte, se la domomastro scius en kiu noktoparto venos la ŝtelisto, li viglus kaj ne lasus sian pordon disbati.”

Ĉiun momenton, atentigas Jesuo, povas senbridiĝi la persekutado, sed ĝi estos des pli terura, ju pli neatendita estas ĝia deveno. Jesuo jam diris ke la disĉiploj estos malamataj kaj mortigataj de iliaj familianoj mem.

Kaj jen la konkludo, “Tial ankaŭ vi estu pretaj, ĉar la Filo de la homo venas kiam vi ne atendos.“

La evangeliisto do resumas kaj reformulas la du beatecojn. La unua beateco, tiu por esti akceptitaj en la savon, estas la akcepto de la beateco pri la malriĉeco, kiu permesas havi Dion kiel reĝon, do la negativaj efikoj de la malriĉeco estas nuligitaj. La lasta beateco pri la persekutado pro la fideleco al tiu ĉi mesaĝo, sed ankaŭ en tiu kazo la persekutatoj havas Dion kiel reĝon, ĉar Dio sin metas ĉiam je la flanko de la persekutatoj kaj neniam je la flanko de la persekutantoj.